

[noto] fonto: “DARMORADOTURNA SUTRO KAJ ALIAJ” (rondeto de budaisma kulturo, 1936)

Darmoradoturna Sutro

Dhammacakkapavattana sutta / 轉法輪經

trad. **Takeuĉi Tookiĉi**, Japanio

ADORON AL LIA BAGAVA ARAHATA

ĜUSTE PERFEKTA BUDAO¹

1. Tiel mi aŭdis: Iam, kiam Bagavo² loĝis en Isipatana-cervoparko apud Baranaso, Bagavo alparolis al kvin grupantaj almozuloj:
2. Almozuloj, ekzistas du ekstremoj, al kiuj senhejmuloj ne devas proksimiĝi, Kio estas du? Unu estas ĉeamo-amuzado fia, triviala, ne sankta, nenian profiton portanta: la alia estas sinturmentado dolora, nesankta, senfrukta; -- ja almozuloj, malproksimiĝu for de la du ambaŭ ekstremoj, la meza vojo estas elmontrita de Tatagato, kiu malfermas okulon kaj saĝon, kondukas al trankvilo, mistero, perfekta intelekto, nirvano.
3. Kio estas la meza vojo elmontrita de Tatagato, kiu malfermas okulon, kaj saĝon, kondukas al trankvilo, mistero, perfekta intelekto, nirvano? Ĝi estas la okera vojo: ĝusta vido, ĝusta penso, ĝusta parolo, ĝusta ago, ĝusta vivo, ĝusta peno, ĝusta pripenso, ĝusta samadio. Ĉi tio ja, almozuloj, estas la meza vojo elmontrita de Tatagato, kiu malfermas okulon kaj saĝon, kondukas al trankvilo, mistero, perfekta intelekto, nirvano.
4. Ĉi tio ja, almozuloj, estas doloro, sankta vero: nasko estas doloro, maljuno estas doloro, malsano estas doloro, morto estas doloro, kuniĝo de malamantoj estas doloro, disiĝo de amantoj estas doloro, sume kvin ekzistelementoj estas doloroj.³

¹ Ĉe la komenco de sankta skribo aŭ darma parolo oni metas tiun ĉi adoran mesaĝon en la palia lingvo.
Namo Tassa Bhagavato Arahato Sammā Sambudhassa.

² Bagavato: La glora, la respektiginda. Unu el la dek epitetoj de la budho.
sanskrite: *bhagavat*, palie: *bhagavant/bhagavā*

³ Ĉi tie la originala teksto temas pri la ok “doloroj”, sed la tradukinto eble erare ne tradukis ankoraŭ unu “doloron”. Tio estas “doloro” pro neakiro de dezirataĵoj.

5. Ĉi tio vere ja, almozuloj, estas dolororigino, sankta vero: la deziro al tio, kio kaŭzas renaskiĝon kaj akompanas ĝojon, avidon, tie aŭ ĉi tie produktas ĝuon, tio estas amdeziro, ekzistodeziro, malekzistodeziro.
6. Ĉi tio vere ja, almozuloj, estas sendoloro, sankta vero: vere ĉiujn dezirojn tute senrezerve senigita, tio estas sen avido, libereco, malligiteco.
7. Ĉi tio vere ja, almozuloj, estas dolorseniga vojo, sankta vero, Ĉi tio estas vere sankta okera vojo: ĝusta vido, ĝusta penso, ĝusta parolo, ĝusta ago, ĝusta vivo, ĝusta peno, ĝusta pripenso, ĝusta samadio.
8. Ke ĉi tio estas doloro, sankta vero, almozuloj, por antaŭe neaŭdita Darmo ĉe mi ekaperis okulo, prudento, saĝo, klereco kaj lumo.⁴
9. Ke ĉi tiu doloro, sankta vero devas esti komprenata, almozuloj, por antaŭe neaŭdita Darmo ĉe mi ekaperis okulo. prudento, saĝo, klereco kaj lumo.
10. Ke ĉi tio estas dolororigino, sankta vero, almozuloj, por antaŭe neaŭdidta Darmo ĉe mi ekaperis okulo, prudento, saĝo, klereco kaj lumo.
11. Ke ĉi tiu dolororigino, sankta vero devas esti disrompita. -- Ke ĉi tiu dolororigino, sankta vero jam estas disrompita, almozuloj, por antaŭe neaŭdita Darmo ĉe mi ekaperis, okulo, prudento, saĝo, klereco kaj lumo.
12. Ke ĉi tio estas sendoloro, sankta vero, almozuloj, por ĉi tiu antaŭe neaŭdita Darmo ĉe mi ekaperis okulo, prudento, saĝo, klereco kaj lumo.
13. Ke ĉi tiu sendoloro, sankta vero devas esti realigita. -- Ke ĉi tiu sendoloro sankta vero jam estas realigita, por antaŭe neŭdita Darmo ĉe mi ekaperis okulo, prudento, saĝo, klereco kaj lumo.
14. Ke ĉi tio estas doloroseniga vojo, sankta vero, almozuloj, por ĉi tiu ankoraŭ neaŭdita Darmo ĉe mi ekaperis okulo, prudento, saĝo, klereco kaj lumo.
15. Ke ĉi tiu doloroseniga vojo, sankta vero devas esti praktikata. -- Ke ĉi tiu vere ankaŭ doloroseniga vojo, sankta vero jam estis praktikata de mi, almozuloj, por ĉi tiu ankoraŭ neaŭdita Darmo ĉe mi ekaperis okulo, prudento, saĝo, klereco kaj lumo.
16. Dum mi ne havis tiel purigan trigradan dekduprocedan komprenon por ĉi tiuj kvar sanktaj veroj, almozuloj, mi ne diris, ke en la mondo de dioj, de maraoj, de Bramao⁵, de sramanoj⁶, de bramanoj⁷ ĉe la tuta mondo homa kaj dia mi akiris la plej altan

⁴ gramatike konfuzita frazo. Pli postaj frazoj havas samajn konfuzojn.

⁵ sanskrite *Brahmā*. Brahmo. En hinduisma teksto dio kreinta la universon.

⁶ sanskrite *śramaṇā*. Ŝramano

⁷ sanskrite *Brāhmaṇa*. Brahmano. Membro de tradicia pastra varno de malnovhinda socio. Ĝi devas esti diferencigita de Brahmo, dio.

perfekte kompletan scion.

17. Vere, almozuloj, ĉar ĉe ĉi tiuj kvar sanktaj veroj, tiel puriga trigrada dekduproceda kompreno ekaperis en mi, mi deklaris, ke mi akiris la plej altan perfekte kompletan scion, en la tuta mondo de dioj, de maraoj, de Bramao, de sramanoj, de bramanoj, ĉiuj mondoj de dioj kaj homoj.
18. Ankaŭ ĉe mi ekapris scio kaj vido, ke mia koro liberigita neniam ŝanceliĝas. Ĉi tio estas la lasta naskiĝo, neniam mi naskiĝos plu.
19. Ĉe ĉi tiu parolo de Bagavo kun plezuro la kvin ĝrantaĵoj almozuloj ĝojegis.
20. Kiam la deklaro estis farata, tiam respektata Kondanĵo foriĝis for de polvo kaj ekhavis puran okulon, ke ĉiu, kiu ajn kaŭziĝas, pereas.
21. Kiam tiel Bagavo turnis Darmoradon, surteraj dioj ekkriis vortojn: “Tiel Bagavo apud Baranaso en Isipatana-cervoparko turnis Darmoradon ne turnitan de sramano, nek de bramanoj, nek de dioj, nek de maraoj, nek de Bramao, nek de iu ajn en la mondo.”
22. Aŭdinte la voĉon de la surteraj dioj, la kvar reĝdijoj ekkriis laŭte: “Tiel Bagavo apud Baranaso en Isipatana-cervoparko turnis Darmoradon ne turnitan de sramano, nek de bramanoj, nek de dioj, nek de maraoj, nek de Bramao, nek de iu ajn en la mondo.”
23. Aŭdinte la voĉon de la kvar reĝdijoj, dioj de Tavatimso⁸ ekkriis laŭte: “Tiel Bagavo apud Baranaso en Isipatana-cervoparko turnis Darmoradon ne turnitan de sramano, nek de bramanoj, nek de dioj, nek de maraoj, nek de Bramao, nek de iu ajn en la mondo.”
24. Ankaŭ Jamadio⁹, Tusitadio, Nirmanaratidio, Paranirmitabasavartadio, Bramaparisagĝdio, Bramapurohitadio, Mahabramadio, Paritrabadio, Apramanabadio, Abasvaradio, Paritasubadio, Apramanasubadio, Subakisnadio, Vrihatpaladio, Asangasatvadio, Avihadio, Atapadio, Sudarsadio, Sudarsidio, Akanistadio, nu post alia, aŭdente la voĉon ĉiu ekkriis laŭte: “Tiel Bagavo apud Baranaso en Isipatana-cervoparko turnis Darmoradon ne turnitan de sramano, nek de bramanoj, nek de dioj, nek de maraoj, nek de Bramao, nek de iu ajn en la mondo.”
25. En tiu ĉi momento samtempe la voĉo atingis la mondon de Bramao kaj ĉi tiu deko da milmondoj forte tremegis kaj senmezura grandioza lumo pli supera ol la dipotenco de dioj lumigis la mondon.

⁸ sanskrite *tāvatiṃsa*. La dua el la ses diaj mondoj situantaj ene de la kosmo katenita de deziro, kaj ĝi mem inkludas entute 33 mondojn.

⁹ dio de Jamao; Jamao estas sanskrite *yāma*. La tria el la ses diaj mondoj situantaj ene de la kosmo katenita de deziro. Cetere, ĉi tie multaj dioj estas listigitaj, sed verŝajne ne indus klarigi ĉiujn unuope.

26. Tiam Bagavo diris benante laŭdan vorton: “Komprenis jam Kondanjo, komprenis jam Kondanjo!” (**aññāsi** vata, bho, koṇḍañño, **aññāsi** vata, bho, koṇḍañño' ti!)
De tiam respektata Kondanjo estas nomata Anja-kondanjo.¹⁰

¹⁰ Iluminiĝinta Kondanjo